



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La leĝo de la vivo kaj ties promeso

Martinus:

La sezonoj kaj la parolo de la vivo

Martinus:

La sekreta potenco malantaŭ la armiloj

Martinus:

Kio estas mondliberiganto?

Martinus:

La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon?

Hokan Lundberg:

La Ĉi-metodo

Svend Erik Rævdal:

Epokfara mondbildo



Sur la kovrilpaĝo estas bildo de la preĝejo “Pater Noster” kiu situas sur La Monto de Olivoj, en Jerusalemo. Jen la teksto de la bildo en iomete alia vortigo:

Patro Nia, Kiu estas en la ĉielo. Via nomo estu sanktigita. Venu via regno, Plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni nian ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas niajn ŝuldantojn. Kaj ne konduku nin en tenton. Sed liberigu nin de la malbono. Ĉar Viaj estas eterne la regno kaj la potenco kaj la gloro. Amen.

En la libreto “La mistero de la preĝo” Martinus analizas la enhavon de “Patro Nia” kaj klarigas ĝin el kosma vidpunkto.

La preĝo havas siajn proprajn leĝojn, estas speciala scienco

Sed ĉu la preĝo do povas garantii la feliĉon? – Jes, la preĝo povas fariĝi tiel perfekta, ke en kunligo kun kosma scio ĝi povas komplete ekskluzivi la malhelajn ombrojn de malĝojoj kaj malfeliĉoj de la anima regiono de la individuo. Ne tiel ke la preĝo faras ĝin imuna kontraŭ doloroj kaj suferoj en karno kaj sango. Tre ofte la korpaj suferoj estas tute neŝanĝitaj malgraŭ multe da preĝo. Ankaŭ ne estas tiel, ke la preĝo estas sorĉilo, per kiu oni kapablas doni al tiuj, kiujn oni amas, longan vivon, aŭ igi siajn infanojn esti tiuj idealoj en sano, moralo, talentaro kaj pozicio, kio estas la plej sincera espero aŭ revo de ĉiu natura patro aŭ patrino. [...]

Tiel la preĝo havas siajn proprajn leĝojn, sian propran strukturon, sian propran certan celon. Kono pri la preĝo estas speciala scienco. Sen tiu kono oni grandskale uzas la preĝon en situacioj kaj sur kampoj, kie ĝi estas tute neplenumebla fare de la Providenco, sekve de kio estiĝas en la konscio de la preĝanto malesperiĝo, dubo kaj nekredo je la Providenco. [...]


Preĝi pri io en la spirito de Jesuo sekve estas la samo kiel preĝi pri io en kontakto kun la ĉioamo, kio signifas: la altruismon, kaj per tio en kontakto kun la dia volo, en kontakto kun la rekta deziro de Dio. [...]

Preĝo do povas manifestiĝi laŭ du manieroj, nome en ”la nomo de Jesuo” aŭ la spirito de altruismo, kie oni ĝuste diras ”Patro, plenumiĝu ne mia volo, sed via”, kaj aliflanke en la spirito de la egoismo, kie oni nepre postulas plenumon de sia propra deziro tute sendepende de la prezo aŭ de tio, kiom da damaĝo kaj sufero tio sekvigos laŭ kolektiva vidpunkto en la granda dia plano. En la unua kazo la preĝo plenumiĝos, dum en la lasta kazo ĝi ne estas plenumebla. Tial por la preĝanto la granda problemo estas lerni preĝi en ”la nomo de Jesuo”, kio do signifas: en la spirito de la ĉioamo, tiu spirito, en kiu la preĝo en neniu ajn kazo povas esti io alia ol grandaj ĝojoj kaj beno por ĉiuj kaj ĝeno aŭ malfeliĉo por absolute neniuj.

Elĉerpoj el la dua ĉapitro de la libro
”La mistero de la preĝo” de Martinus.

La sezonoj kaj la parolo de la vivo

de Martinus



1. La dia revelacio de la eternaj principoj de la vivo

Ĉi tie sur niaj latitudoj ni havas la grandan dian bonon, ke la principoj de la fizika naturo malkaŝiĝas tiel, ke la ŝanĝiĝantaj scenejoj de tia naturo fariĝas bildo aŭ simbolo de la principoj de la eterna vivo mem. Ĉi tie ni spertas, ke la naturo malkaŝas por ni kvar grandajn kontraŝtriciajn partojn, kiujn ni nomas “sezonoj”. Ni havas la vintron, la printempon, la someron kaj la aŭtunon. Ĉe la ekvatoro ĉefe estas eterna somero, kaj ĉe la polusoj eterna vintro. Sed ĉe niaj latitudoj ĉiu sezono estas tre forte markita. Kaj tial ni sur niaj latitudoj havas la plej grandan instruon aŭ malkaŝon de la plej grandaj fundamentaj principoj por la travivado de la vivo.

2. La ciklo de la jaro

Ni traktas ĉe ni la “vintron” kiel tempo-parton, etan epokon, kie la malvarmo kaj la frosto mortigas kaj baras la disvolvon de la vivo. Temas pri la principo de la trankvilo aŭ morto. Ni vidas arbojn sen folioj. Ni vidas, ke la vivo de milionoj da estuloj stagnis. La insektoj estas for, la migrobirdoj estas for. La florherbejoj de la kampo estas kovritaj per neĝo, kiu kiel kadavrolitotuko kuŝas super ili. La spegulblankaj lagoj kun iliaj etaj plaŭdantaj ondoj glaciĝis. La vintro estas la simbolo de la morto.

Sed dank’ al la eternaj strukturoj de la vivo la vintro devas cedi al alia principo – tiu principo, kiu sin elvokas kiel

“la printempo”. Nova potenco komencas regi. Aperas komenciĝanta ŝanĝiĝo en la klimato. Fariĝas pli varme. La glacio kaj la neĝo degelas. El la neĝo la unuaj etaj floroj komencas aperi. Finfine ĉia neĝo kaj glacio estas for. La migrobirdoj revenas kaj plenigas la aeron per siaj tonimperioj. La arboj komencas ricevi burĝonojn, kiuj iom post iom disvolviĝas. Ĉiuj tiuj etaj insektoj ankaŭ aperas. Kaj la homoj ricevas multe da laboro en la kampoj kaj la ĝardenoj. Kaj ĉio vekiĝas al vivo kaj ĝojo, ĉar la vintro estas for. “La printempo” sekve estas simbolo de vekiĝanta vivo, kiu post iaspeca ripozo nun per nova forto sin elvolvas.

Post la printempo “la somero” venas. Tiam la vivo estas en sia plej alta disvolvado. Tiam ĉio kulminas en kolororgioj. La somervarmo regas. Floroj kaj floroj kaj denove floroj kolorigas la blankan lumon de la tago en diverseco de kolorkombinoj. De la nigra humo dia kemio kunmetis la plej grandan arton de la vivo en kolorojn, kaj la homoj ankaŭ disvolvas siajn vivojn. Estas la periodo de ferioj kaj vojaĝoj. Ĉiuj forlasas la mallumajn ĉambrojn, por ke ili povu esti en la sunlumo kiel eble plej multe. Ĉio, kion oni pli frue devis ami kaj protekti en la kadro de la artefaritaj varmo kaj lumo de la domoj, nun montras sin en la brilanta brakumo de la naturo mem de kulminanta lumo kaj varmo. La tagoj estas longaj, la nokto mallonga. Ni estas en la terenoj de la vivo.

Sed ni troviĝas en la temp- kaj spac- dimensia mondo. Ĉio havas komencon kaj finon. La somero ankaŭ devas cedi al tiu naturepoko, kiun ni konas kiel “la aŭtuno”. Nun multe da floroj transformiĝis al maturaj kaj bongustaj fruktoj. Kaj rilate al multaj aliaj kampoj la vivo maturigis tion, kio pli frue estis nematura kaj senhelpa. La grenon kaj aliajn kultivaĵojn de la kampo oni rikoltas kaj alportas en la domon. La foliaro velkas. La malvarmo komenciĝas. La lumo kaj la varmo malaperas. Neĝo kaj glacio denove revizias ilian eniron. Kaj denove ni revenis al nia elirpunkto, la vintro. Kio estas tio, kion ni vidis rilate al tiaspeca ciklo? – Ni vidis nenion malpli ol la revelacion de Dio de la eternaj bazprincipoj de la vivo mem, laŭ kiuj absolute ĉio en la vivo aranĝiĝas kaj viviĝas.

3. La ciklo de la tagnokto

Ni vidas la saman principon en multaj aliaj formato. Kio estas tagnokto alie ol malkaŝo de la samaj kvar grandaj principoj? Ĉu ne la meznokto estas la tereno de malvarmo kaj mallumo? Ĉu ni ne ĉi tie vidas, kiel bestoj kaj homoj ripozas kaj dormas? – Kio estas la mateno? – Ĉu tio ne estas la samo kiel la reveno de la lumo kaj varmo kaj la vekigo de la vivo? – Ĉu ne la svarma periodo de la urboj proksimume kongruas al la vivo de la migrantaj birdoj? Ĉiuj hastas por povi atingi la tagan laboron, al la disvolvado de la vivo, same kiel la floroj aŭ la vegetaĵaro printempe. Kaj kio estas la tagmezo alie ol la principo de la mez-somero? Tiam la lumo kaj la varmo de la tago estas plej alta. Poste venos la principo de la postagmezo aŭ la vespero. Ĉiuj rekuras al la trankvilo post la disvolvo kaj rikolto de la tago. La lumo kaj la varmo malaperas, kaj la nokto aŭ la principo de la vintro denove etendiĝas super dormantan mondon.

4. La ciklo de la vivo

Se ni observas nian propran tervivon de la naskiĝo ĝis la tombo, ni vidas la manifestiĝon de la samaj principoj. La eta infano reprezentas la principon de la vintro. Estas same kiel la senfolia arbo en la arbaro. Estas interna vivforto, kiu iom post iom esprimos sin en la ekstera mondo, same kiel la interna vivforto de la arbo iom post iom plenigas siajn branĉojn per mirinde belaj folioj. Tiel la konscio de la infano ankaŭ aperas. Kaj tiu epoko, en kiu la konscio de la infano do aperas, ni nomas la junecon. Tio do kongruas al la printempo. Poste aperas la plenkreska aĝo. Ne estas malfacile vidi, ke ĝi kongruas al la principo de la somero. Ĉi tie la homo troviĝas en sia plej alta fizika disvolviĝo. Poste venos la principo de la aŭtuno en la organismo. Tion ni konas kiel la maljuna aĝo. Kaj la aktiveco de la estulo stagnas. Ĝi forjetas sian velkintan folikronon, la organismon.

5. La vivtravivado estas bazitaj sur kontrastoj

Sed kion do tiuj cikloprincipoj, tiuj kvar sezonoj, povas rakonti al ni? Ili rakontas ne malpli ol la fabelo de la eterna vivo. Ili ja rekte parolas pri vivo kaj morto, sed ili ankaŭ rakontas, ke vivo kaj morto estas tiuj du kontrastoj, per kiuj la travivado de la vivo devas esti konstruita. Se tiuj du kontrastoj ne troviĝus, neniu ajn formo de vivtravivado ekzistus. Kaj tiam eterna morto ŝvebus super la akvoj anstataŭ la eterna spirito de Dio, t.e. la eterna konscio de Dio. Rilate al kiu ajn travivado necese troviĝu kontrastoj aŭ maloj. Sen maloj ĉiu ajn formo de percepto maleblus. Kion oni entute povus sperti, se ne la maloj ekzistus? Ĉio, kion ni spertas estas maloj al aliaj aferoj, kiujn ni spertis. Tio, kio ne havas malon, estas neperceptebla. Tial lumo kaj mallumo devas ekzisti. Kaj tial ankaŭ la tiel nomata “bono”

devas ekzisti, same kiel la tiel nomata “malbono”. Do, estas tiuj kontrastoj, de kiuj la vivo kreiĝas.

Sed la sezonoj ne nur montras al ni, ke tiuj kontrastoj necesas por krei vivtravivadon. Ili ankaŭ montras al ni la ĝustan kombinon de la kontrastoj por disvolvo de la vivo. Se ni esploras la nordajn aŭ sudajn polustereojn, ni vidas la efikojn de tro supera apero de la malluma kaj malvarma kontrastoj. Kaj la rezulto estas nur glacio kaj neĝo kaj denove glacio kaj neĝo. Eterna mortiga stato. Se ni esploras la regionon ĉe la ekvatoro, ni vidas tro superan aperon de la luma kaj varma kontrastoj. Estas fakto ke en multaj ekvatoraj lokoj estas abunda fekundeco, sed aldoni de nur kelkaj pliaj varmogradoj kaŭzus, ke la ekvatora regiono fariĝus mortiga, ĉiobrunla dezerttereno. Ke entute en la ekvatorzono troviĝas pluvo kaj per tio plantoj estas pro la malvarmo de aliaj lokoj, kaj ke la neĝo troviĝas ĉe la polusoj estas pro la varmo en aliaj lokoj. Sekve ne ekzistus manifestado de vivo sur la tero, se unu el la du kontrastoj tute mankus.

6. La malbono kaj la bono estas ja tiuj du grandaj kontrastoj, kiuj ambaŭ estas same necesaj por la vivtravivado

Tiuj principoj ankaŭ ekzistas en la organismoj de la estuloj mem kaj sekve en iliaj vivtravivado, ĉar ĉi tie la tiel nomata “malbono” kaj “bono” estas same necesaj, por ke ili entute povu sperti la vivon. Sed ĉi tie ni ankaŭ vidas, ke estiĝas arkta klimato tie en la menso, kie estas tro multe da mallumkontrasto, kaj ke estiĝas dezertklimato, tie kie estas tro multe da lumkontrasto.

En la regiono de niaj latitudoj ni vidas do kvar diversajn specojn de komponado de la kontrastoj, por ke la vivo povu esti daŭrigata. Ni vidas, ke la vintroprincipo konsistigas ĝuste tian

adapton, por ke la vivo povu esti konservata en tipo de dormanta stato sen vere morti. Ni same vidas kiel la lumkontrasto denove ricevas pli kaj pli da potenco, kaj okazas vekigo. Fekundeco kaj vivo pli kaj pli influas, ĝis specife certa kondiĉo inter la du kontrastoj estos atingita. Kaj la vivo tiam troviĝas en sia plej riĉa kaj la plej agrabla kaj ĝojiga aktivado. Tiam la vivtravivado troviĝas en sia somerprincipo. Post tiu kulmina vivtravivado denove la ripozo kaj trankvilo estas necesa. Kaj la kontrasto de mallumo pli kaj pli montras sin, kaj la maljuneco kun sia kadukeco kaj velkiĝo venas. Tio, kion ni nomas “la malbono”, reale ne estas io malbona, se aperas en certa specifa kombinkondiĉo al la lumo, same kiel la lumo ne estas lumo, se ĝi same ne ekzistas en specife adaptita formo rilate al la mallumo.

Tio, kion ni nomas “la malbono” kaj “la bono”, reale nur estas la du grandaj kontrastoj, kiuj ambaŭ estas same necesaj kaj tial same “bonaj” en la vivtravivado. Se ni nomas la kontrastojn “malbonaj”, do la kaŭzo estas, ke ni ankoraŭ ne lernis kombini ilin en la ĝusta interrilato en nia konscio. En kelkaj kazoj ni havas tro grandan mallumkontraston rilate al nia lumkontrasto, ekzemple en nia rilato al tiuj, kiujn ni malamas. Kaj en aliaj kazoj ni havas tro grandan lumkontraston rilate al nia mallumkontrasto. Tio estas la kazo en nia rilato al tiuj, en kiuj ni enamiĝas. Kaj la malfeliĉa amo brulas en formo de mortiga ĵaluzo kaj envio sub la enamiĝo.

7. La naturo estas la instruado de la vivo mem

Pere de la studo de la somera kontrastrilato ni do vidas, ke ĝi ekskluzive estas bazita sur certa rilato inter varmo kaj malvarmo, same kiel la vintro kaj la du aliaj sezonoj, la printempo kaj la aŭtuno, estas bazitaj sur certa specifa rilato inter du kontrastoj. Evidente la naturo

estas instruado pri la vivo mem. Pere de certa rilato inter malvarmo kaj varmo ĝi do kreas someron. La du samaj kontrastoj loĝas en la menso de la homo, kaj tial la homo ankaŭ povas kombini siajn lum- kaj mallumkontrastojn kaj tiel krei “vintron” aŭ “someron”, kiujn ĝi montras al sia ĉirkaŭaĵo. Nun vi povus pritrakti vin mem kaj eltrovi, ĉu vi kreas someron aŭ vintron en viaj rilatoj al tiu aŭ tiu homo. La vera amo, sen enamiĝo, estas do la principo de somero. Kaj tro granda mallumo do reprezentas la principon de malamo. Kiam oni miksas siajn sentojn, lumo kaj mallumo, tiel ke ili konsistigas la sunluman kaj varmigan kaj vivigan principon de la somero, tio do reprezentas la instruadon de la naturo mem. Se vi havas tro multe da mallumo en via menso rilate al la lumo, kiun oni facile povas rekoni pere de tio, ke se vi deziras iun malbonan al via proksimulo, deziras ke li iamaniere estu vundigita, tiam vi havas tro multe da mallumkontrastoj en via menso. Kaj vi devas nepre ĉi tie, kie tiu kombino regas en via menso, aperi en mortiga vintrostato. Via malamo aŭ malsimpatio estas la samo kiel malvarmo aŭ frosto. Kaj ĉi tie iĝas ĝuste nomi ĝin “la malbono”. Se tiu via malsimpatio aŭ tro granda mallumkontrasto estas direktita al homo, kiu faris iun malbonon al vi, aŭ iamaniere ĝenis vin, tio tute sendiferencas. Tiu lia stato ne nuligas la efikojn de via specifa vintrostato. Se vi ne provas ŝanĝi tiun vian vintrostaton

rilate al li, tio daŭre tenos vian propran vivĝojon en frostigita ene en via propra glacio kaj malvarmo.

8. La homo kreskas antaŭen al la mensostato de la printempo kaj somero

Temas do pri tio, ke ni atingu la staton en kiu ni pardonas nian proksimulon. Sed por ke povu faciligi la evoluon de tiu kapablo, necesas lerni akcepti, ke la proksimulo ne povas esti alia ol li ĝuste nun estas. Lia kombino de la kontrastoj devas ja reprezenti tiun stadion, kiun li atingis rilate al la kreo de menso kaj konduto al sia ĉirkaŭaĵo. Pere de la evoluo oni iom post iom lernas tion, kaj tiam oni ne plu povas elteni fari tiom multe da malbono, aŭ tiom multe da mallumkontrastoj en sia konscio rilate al li. Kaj tiamaniere la homo mem kreskas al la mensostato de la printempo kaj somero, ĝis la vera mikso de lumo kaj mallumo. Tiu mikso en kiu nek la lumo nek la mallumo iĝas iu malbono, sed estas inkluditaj kiel dia beno, supertera kareso, ekbrilo de la radimondo de la spirito de Dio. Kaj tio sendube okazas kie ni amas nian proksimulon kiel nin mem kaj tiel Dion, kiu estas la lumfonto mem malantaŭ ambaŭ kontrastoj en ni.

De prelego en Martinus-Instituto, dimanĉe la 27an de majo 1956. Presita en dana Kosmos n-ro 1/2007 kaj en 2002 en Artikolaro 1, n-ro 34.

Traduko Helen Claesson en 2014



La sekreta potenco malantaŭ la armiloj

de Martinus



1. Ĉu kapitalismo, militismo, politiko kaj komerco estas la kaŭzoj malantaŭ la mortiga potenco?

Ni vivas en tempo, en kiu abundas parolo pri armiloj. Oni parolas pri bombaviadiloj kaj batalŝipoj, pri militotankoj kaj misiloj, maŝinpafiloj kaj grenadoj ktp. Kulminanta saboto kaj grandstilaj detruoj ĵetas bruegon kaj fumnubojn alten en la atmosferon. Murdado kaj sangelverŝoj abundas kaj mortokrioj de tutaj popoloj sonas tra la mondo. Lavango de morto ruliĝas super la teron, kaj la granda problemo por la suferanta homaro neeviteble estas la demando: “Kio aŭ kiu estas tiu mortiga potenco”? –

Al tio oni eble respondos, ke la mortiga potenco estas la “kapitalismo”, la “militismo”, tiu aŭ alia formo de “politiko”, la “komerco” aŭ la monopoligo de la krudmaterialoj de tiuj aŭ aliaj landoj. Same tiel oni eble asertos, ke la religio kaj la religiaj ideoj povas kaŭzi militon kaj batalon pri la valoraĵoj. Sed ĉu tio estas ĝusta? – Ĉu tiuj fenomenoj estas la origina kaŭzo de la mortolavango, de la katastrofo, kiu nun invadas la teron? –

2. Kapitalismo kaj militismo en si mem ne necese estas militelvokaj

Kompreneble estas ĝuste, ke la menciitaj fenomenoj estas la eksteraĵo, la videbla flanko de la milit- kaj batalenergioj. Sed el tio, ke io efikas en iu el la menciitaj fenomenoj, ne sekvas, ke tio en si mem estas io “malbona” aŭ militelvoka. “Kapitalismo” ne necese en si mem estas

“malbona” – eĉ kontraŭe. La “kapitalismo” ja ebligas al la “kapitalisto” fari multe pli grandan helpon al la proksimulo, ol ĉiu ajn alia povas fari. Milionojn da kronoj li povas donaci por diversaj bonfaraj celoj. Li povas subteni orfojn, mal-sanulojn kaj aliajn suferantojn. Grandajn sumojn li povas oferi al hospitaloj, sanatorioj kaj maljunulejoj. Li povas konstruigi lernejojn kaj institutojn de instruado. En multaj manieroj, kaj laŭ grado preskaŭ unika, li povas plifaciligi la vivon por sia malriĉa proksimulo. Alia afero estas, ke la “kapitalisto” eble ne uzas sian kapitalon kaj siajn posedaĵojn en la montrita maniero, sed nur por egoistaj celoj, ke li eble eĉ kontraŭbatalas tiajn farojn. Sed tion kaŭzas do ne la kapitalo mem aŭ la riĉaĵoj, kaj la samo validas kompreneble ankaŭ por la “militismo”. Ankaŭ ĝi ne estas en si mem malbona aŭ militelvoka. Kontraŭe ĝi eĉ povas esti militomalhela. Ĝi povas esti la potenco, kiu bridas krimajn tendencojn kaj baras arogojn kaj atakojn de posedavidaj landoj. Noblan kulturon ĝi povas gardi kontraŭ vandalismo. En la socio ĝi povas sekurigi juston kaj egalrajton por ĉiuj; kaj kie anarkistaj tendencoj minacas, ĝi povas esti eĉ nepre necesa kaj vivkondiĉa faktoro malantaŭ kvieto kaj ordo. Alia afero estas, ke oni eble ne uzas la “militismon” en tiu “polica” maniero, sed kontraŭe uzas ĝin por prirabi kaj tirani aliajn malpli forte armitajn ŝtatojn, por humiligi, terori kaj subpremi aliajn popolojn kaj rasojn. La “militismo” mem do tute ne kaŭzas tion.

3. Ankaŭ politiko en si mem ne estas io malbona aŭ militelvoka

“Politiko” ne principe devias de la menciitaj du faktoroj. En si mem ĝi povas prezenti abundon da energio kaj potenco, kiu povas direkti kaj kapitalismon kaj militismon en ĝustan rilaton al la plej alta moralo. Esplorante la aferon “politiko” oni vidas, ke same kiel la du aliaj, ankaŭ ĝi principe ne estas io “malbona”. Eĉ al la plej altaj idealoj kaj humanaj celoj ĝi povas servi; sed same nature ĝi povas servi ankaŭ al ekstrema vanteco kaj al avido pri konkero kaj potenco; ĝi povas servi al subpremo kaj tiel krei el iuj homoj superulojn kaj por aliaj krei sklavecon malkaŝan aŭ kamuflitan. Sed ion, kio estas same uzebla en la servo de “bono” kiel en tiu de “malbono”, oni ne povas prijuĝi kiel ion “malbonan”. Nur tio, kio kaŭzas ke la menciitaj aferoj servas al “malbono”, prave meritas tian prijuĝon.

4. Ankaŭ komerco en sia pura stato estas tute libera de malbono

Rilate al la kvara el la supre menciitaj fenomenoj, kiu sub la nocio “komerco” regas preskaŭ la tutan civilizitan mondon, estas tiel ke ankaŭ ĝi en si mem, aŭ en sia pura formo, estas tute libera de malbono kaj mensa malumo. Kontraŭe ĝi esprimas simple la ĉefprincipon de la eterna Kreanto mem: “Io kontraŭ io”, kio signifas: “sama valoro kontraŭ sama valoro”. En tia perfekte pura stato “komerco” prezentas plej altan gradon de “la bono” kaj subtenas la eternan ekvilibron de la universo. En tiu stato ĝi neniel egoisme ekspluatas aliajn vivajn estulojn. Tiu, kiu tiel plenumas “la principon de komerco”, neniel povas parazite alpropigi al si la bonaĵojn de la vivo aŭ lukse kaj komforte vivi en maldiligenteco kaj eksceso je la kosto de sano kaj naturaj vivpostuloj de aliuloj, neniel li kaŭzas al ili ruiniĝon en mizero, malhavo,

malsato kaj malhonoro. Praktikante komercon kiel kamuflitan rabadon, aŭ alivorte, uzante ĝin por akiri al si – ne “saman valoron kontraŭ sama valoro”, sed “plivaloron kontraŭ malplivaloro”, la koncerna “komercisto” ja havigas al si kvanton da valoro, kontraŭ kiu li liveris nenion. Do tiu kvanto estas ŝtelita, kaj la koncerno ne estas vera “komercisto”, sed “ŝtelisto”. Ke la socio protektas tiun “ŝteladon” kamuflitan kiel “komercon” tute ne ŝanĝas la kosman analizon de la afero. Konsekvence tia maniero de komerco ĉiam estas “ŝtelado”, kaj ĉar ĝi estas kamufleta kiel io morale permesita, ĝi estas krome, laŭ kosma juĝo, “fraŭdo”. Sendube la vortoj de la Savanto validas ĉi tie pli ol en iu ajn alia loko: “Tiu, kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu”.

5. La bankroto de la aŭtoritate aprobita komerca principo

Estas memkomprenebla sekvo, ke en civilizacio bazita sur aŭtoritata aprobita de tiaj ŝtelado kaj fraŭdo, la civitanoj devas esti “ŝtelistoj” kaj “fraŭdistoj”, respektive “priŝtelitoj” kaj “prirabitoj”. Ĉu ne estas eĉ tiel, ke tre granda parto de la edukado kaj lerneja instruado ĝuste estas lertigo en tiu “aŭtoritate aprobita ŝtelo – kaj fraŭdosistemo” kamufleta kiel “komerco”? – Sendube ne estas malfacile kompreni, ke tia civilizacio, aŭ kulturo, neniel povas daŭre ekzisti, sed devas malaperi en militado kaj ruiniĝo, en malhonoro kaj pere. – Kaj ĉu ne estas historia fakto, ke sub tiu fraŭdosistemo pereis kulturo post kulturo, ĉiufoje pro la apero de nova pli genie elpensita fraŭdometodo? – Ĉu ne en la tuta mondo multege da ruinaĵoj atestas pri detruitaj urbegoj kaj antaŭ longe velkintaj kulturoj de la pasinteco? – Kaj kio okazas en la nuna tempo ĝuste antaŭ niaj okuloj? – Ĉu ne disfalas en ruinojn la plej alta, la plej evoluinta kulturo de la historio? – Ĉu ne

en la hodiaŭa mondo denove evidentiĝas kiom da mizero kaŭzas la aŭtoritate aprobita “komercoprincipo”? – La sento esti viktimo de ekstrema “maljusteco” – ĉu ĝi ne impetas tra la mondo kiel nekontraŭstarebla uragano, kiu genie elvokas ĉiujn eblojn de torturaj kaj mortigaj ekscesoj? – Nenio plu estas sankta kaj netuŝebla. Venĝo kaj perejo al la “krimuloj” estas la granda ĝenerala deziro. En ĉiuj partioj, en ĉiuj rondoj, sur ĉiuj batalkampoj la homoj krias pri puno al la “krimuloj”, kio signifas punon al la kontraŭuloj. Unu sola granda sento regas la nuntempan homaron, nome la sento de “martireco”, la sento esti viktimo de ekstrema maljusto. Kiu el la batalantaj partioj havas alian senton? Ĉu iu el la interbatalantoj elkrias: “Mi eraris kaj volas nun pentofari pro miaj krimoj; ĉion mi volas kompensi, kion de aliaj estuloj mi trompakiris kaj ŝtelis, senkonsidere, ke tio okazis laŭ la leĝoj de la civilizacio kaj kun aŭtoritata aprobo”? – Neniu agas tiel. – La “venkinto” povas perforte igi la “venkiton” agnoski eksteran kapitulacion; sed neniu materia potenco aŭ teroro povas venki alian senton de martireco. La sento esti maljuste traktata de kontraŭulo kreskas laŭ sama grado, kiel oni klopodas venki ĝin per eksteraj potencrimedoj, per puno kaj torturo. Kaj jen ni staras antaŭ la plej granda potenco, kiu entute ekzistas en la universo, potenco antaŭ kiu neeviteble kapitulacas ĉiuj sekretaj kaj konataj armiloj, ĉiuj ekzistantaj eksplodiloj kaj plej geniaj mortigiloj. Tiu potenco estas la “menso”. La “menso” do estas la direktanta, ĉiovenka kaj sekreta potenco malantaŭ la armiloj.

6. La homa menso estas la sekreta potenco, kiu regas kaj direktas kapitalismon, militismon, politikon kaj komercon

Kiel menciite, la principoj kapitalismo, militismo, politiko kaj komerco ne estas en si mem “malbonaj” faktoroj; ili povas esti uzataj same bone en servo de la “bono” kiel la “malbono”. Sekve, tio kio estas “bona” aŭ “malbona” estas la sekreta potenco, kiu regas kaj direktas ilin. Tiu potenco ja estas la “menso”, kiu estas rezulto de la sensokapablo de la viva estulo kaj de la konceptopovo, kiu rezultas de ĝi. La konceptopovo siavice premias la volgvidadon de la estulo, kaj sekve ĝi ankaŭ decidas, ĉu la menciitaj faktoroj servu favore al la “bono” aŭ la “malbono”.

Ĝi do estas la origina kaŭzo, nur ĝin oni povas stampi kiel “bona” aŭ “malbona”. Tio signifas, kosme rigardate, ke la konceptopovo reprezentas nur unu el la du kontrastoj. En neniu situacio ĝi povas reprezenti ambaŭ kontrastojn samtempe. Ĝi ne povas samtempe koncepti aferon kiel “bona” kaj “malbona”. Se ĝi povus, la volgvado nuligiĝus, ĉar tiam ĝi ordonus du kontraŭajn agojn. Voli samtempe du kontraŭaĵojn signifas senefikigi sian volon. Oni ne povas iri samtempe supren kaj malsupren laŭ ŝtuparo. Voli ambaŭ signifas voli nemon. Tial volgvado estas afero, al kiu nepre troviĝas kontrasto; sed ĉu tiun kontraston oni opinias “bona” aŭ “malbona”, dependas nur de la konceptopovo, kiu ekzistas malantaŭ la volgvado, kaj kiu ja estas bazo de la “menso”. La konceptopovo estas rezulto de la sensokapablo, kies tasko estas kontroli, ĉe aktuala afero, ĉu ĝi estas “agrabla” aŭ “malagrabla” por la sensanto. Laŭ sama grado kiel la afero efikas “agrabla”, la konceptopovo igas la volon agi favore al ĝi kaj male okazas, se ĝi efikas “malagrabla” al la sensoj. La sola afero, kiu

povas ŝanĝi la volgvidadon de la estulo estas do la konceptado de la aferoj kiel “agrablaj” aŭ “malagrablaj”.

7. Historia elmonro de la malsaĝeco de la menso

Tiu rekono povas esti identa kun memspertita scio kaj tiel aperi kiel “fakto”, sed ĝi povas ankaŭ esti diro transprenita de aliaj estuloj, kaj tiam, ĉar ĝi eble ne estas korekta “teoria scio”, ĝi povas maksimume esti konjekto, postulato aŭ dogmo. Ricevante pere de la sensoj impresojn pri la vivo aŭ la ĉirkaŭaĵoj, la estulo akiras sian rekonkapablon, sur kiu bazas sin la “menso”, kaj tio montras, el kia amaso da “falsaĵoj” “menso” povas konsistiti. Ĝi povas ekz., esti densa kombino de nur transprenitaj dogmoj, rakontoj de aliuloj kaj postulatoj, al kiuj la estulo sentas sin laŭinstinkte logata, kaj de kiuj li iĝas “kredanta” adepto, kvankam estas neeble al li kontroli, ĉu en la alprenitaj aferoj troviĝas faktoj aŭ reala scio. Ili povas esti tute falsaj, kaj tamen tio ne ŝanĝas liajn kredon kaj fidon al ili. Ili konsistigas lian tutan “menson” kaj senbare direktas lian volgvidadon, kiu siavice premisas lian rilaton al la ĉirkaŭaĵoj.

Imagu kiom terura kaj krie falsa la bildo de la vero povas iĝi sub tiaj cirkonstancoj. Ĉu ne estas nepra fakto, ke stultaj postulatoj, naivaj konjektoj, kaj ekscesaj dogmoj kondukis al teruraj persekuto, subpremo kaj malhonorigo de aliaj estuloj? – Ĉu oni ne vidis kelkfoje, ke estiĝis ideoj sen ia ajn scienca enhavo kaj tiom malsaĝaj, ke ili – realiĝinte per ies volo – ĵetis tutan popolon en malhonoron kaj malfeliĉon, kaŭzis persekuton, militon kaj torturon. Estante preskaŭ neestingebla fajro en ĉia speco de netoleremo, potencavido kaj proreligia persekuto la ideoj rezultigis, en la nomo de “religio”, ne nur sangajn murdojn al bestoj, sed ankaŭ

grandajn sangelverŝajn ceremoniojn kun homoferoj sur “altaroj” starigitaj por “dioj”. Kaj kion oni opinias pri la inkvizicia oferado de centmiloj da viktimoj sur “altaroj de la kristana Dio” pere de Liaj propraj pastroj kaj episkopoj? Imagu, kia drasta ilustraĵo pri “mensa” malsaĝo estas per ĉi ĉio transdonita al la posteularo. Antaŭ la vizaĝo de la unu ĉiopova Dio oni starigis altaron, kiu en la realo estis brulŝtiparo, sur kiu oni vere brulmortigis sian proksimulon opiniante per tio plaĉi al tiu “ĉioama” plej alta estulo, kiu laŭdire estas nur amo, kaj kiu parolis tiel: “Ĉiu, kiu glavon prenas, per glavo pereos”; “al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian”; mallonge esprimite: “amu vian proksimulon kiel vin mem”. Per ardaĵoj pinĉilegoj, korporompiloj kaj aliaj kruelaj torturaparatoj oni perfortis je centmiloj sian malfeliĉan proksimulon – estulon, kiun oni efektive devus ami – en la fajron de tiu arda infero. Do, oni bone kompetentis trovi viktimojn por tiu fajro. La torturinstrumentoj estis “la hakiloj”, per kiuj oni “hakis” “lignon” por tiuj diablaj brulŝtiparoj. Imagu kia atmosfero de sadismo ŝvebis de tie al la trono de la Eternulo, kiaj krudaj sakrilegio kaj krucumo estis denove aplikataj al la alta kaj pura estulo, kiu jam unu fojon lasis sin krucumi por ilustru sur la tero “la homamon”. Per lia nomo oni kaŝis la malsaĝon de propra sadista menso; en lia nomo oni ornamis sian ankoraŭ maldelikatan konsciencon per pompaj ornatotoj kaj oraj krucifiksoj, per rozarioj kaj himnokantado, orgenado kaj brulantaj kandeloj ktp., kaj per ĉi ĉio oni konservis la fidon de la publiko, ke oni havas intiman kontakton kun la Homo-filo.

8. La mondliberiganto devas esti la enkarriĝo de “la scienco de alproksimula amo”

Ni do vidas en ĉi tio, ke malantaŭ la religio kaj la religiaj fortoj en la homo, la “menso” decidas, ĉu tiuj fortoj servu al “bono” aŭ al “malbono”. Kiel vidite, eĉ la “religion” oni povas uzi en servo de la “malbono”, kvankam tio rekte kontraŭas la ĉefordonojn de la religio mem.

Sed la “menso” regas ankaŭ en kampoj ekster la religiaj. Kiom da homoj neniam partoprenis diskonigon de ne tute flata kaj eĉ ĝis malpli alta grado konfirmita fameto pri kunhomo ne tre ŝatata? – Troviĝas eĉ homoj, kiuj klopodas ŝajnigi sin morale granda eminentulo, enkarriĝo de tiu aŭ alia spirita aŭtoritato, kies alveno estas profetita, enkarriĝo de iu mesio, de Jesuo ekzemple, kaj ĉu oni ne vidas, ke ankaŭ eĉ tiaj estuloj povas diskonigi tiajn dubajn “novaĵojn”, precipe en okazoj, kiam la kunhomo apartenas al rondo, kies altintelekteco prezentas ĝenan baron al ilia klopodo ŝajnigi sin la spirita aŭtoritatulo, kiun ili mem kredas esti? –

Sed ĉiu arbo devas porti sian specialan frukton, kaj se homo nomas sin kristo, sed diskonigas pri kunhomo mallaŭdan famon nekonfirmeblan kiel veron, li tute ne povas esti la Kristo, kiu “estas la vero”. Sed ankaŭ kiam la mallaŭda parolo estas vero, li neniel povas esti identa kun la Kristo, kiu “estas la vojo”. Esti la “vojo” ja signifas “ami sian proksimulon kiel sin mem”, kaj sendube neniu povas prave aserti, ke la mondsavanto “Jesuo Kristo” ne estis enkarriĝo de “amo al proksimulo”. Povus tamen esti, ke tion klopodus la “falsaj kristoj”, kies manko de homamo tre evidente kompromitas ilian aserton esti mondsavanto. Sed mondsavanto esence ne estas nur estulo, kiu manifestas eksterajn afablecon, pardonon kaj “amon al la proksimulo”. Li estas multe

pli ol bona kaj afabla homo, li estas enkarriĝinta scienco de amo, ĉar sen tio lia misio kiel mondsavanto estus neebla. En la lumo de tiaj kvalifikoj pri mondsavanto, estulo neeviteble kompromitas sin antaŭ ordinara intelekta homo, se li asertas sin “Kristo” aŭ plej granda gvidanto de la homaro, sed ne atingis laŭ sia evoluo eĉ la staton de bona kaj afabla homo kaj tiom malpli povas posedi la sciencon pri tiu mensostato. Kiel jam dirite tio validas des pli, kiam li malindigas sin per mallaŭda parolo pri kunestuloj, en kies vere alta intelekto li vidas baron antaŭ si mem; kaj per tio montriĝas klare, ke lia mensio metis lin en la vicon de tiuj veropersekutantaj estuloj, pri kiuj Kristo diris: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras”.

9. La mensio de la viva estulo estas la absoluta potenco malantaŭ ĝia manifestado kaj kreado

Metafore ni ĉiuj estas arboj en la granda ĝardeno de Dio, kaj sekve ni devas porti frukton. La frukto do estas la “mensio”, kaj ekzistas multaj specoj. Kelkaj el ni portas fruktojn, kiuj faras nin verodetruaj kaj veropersekutaj, igas nin manifesti iluziojn kaj mensogojn, fari militon kaj okazigi torturon, krucumon kaj morton kaj samtempe kredi, ke farante tion ni estas moralaj granduloj. Aliaj portas fruktojn, kiuj estas nemezureble bonaj, manifestantaj la eternan veron, dissemante vivon kaj forton, ĝojon kaj feliĉon aŭ spiritan sanigon en mensojn, kie ordinare regas la suferoj de superstiĉo, malĝojo kaj malfeliĉo, kaj per tio ili vere – en pli-malpli alta grado – “unuiĝas kun Kristo” aŭ alia mondsavanto. Do la “mensio” estas la ĉiorea potenco malantaŭ la manifestuloj. Estas la “mensio”, kiu faras nin “bonaj” aŭ “malbonaj”. La “mensio” igas nin fabriki la plej krudajn kaj terurajn mortigilojn kaj torturajn instrumentojn, ekz., revolverojn, maŝinpaŝilojn kaj kanonojn,

bombojn kaj militotankojn, fajrojetojn, venenajn gasojn kaj aliajn vivminacajn teknikaĵojn kaj kemiaĵojn. Ĝuste la “menso” igas nin uzi tiajn ilojn en servo de amo aŭ en tiu de malamo. Estas ankaŭ la “menso”, kiu igas nin krei la geniajn bonaĵojn en la socio, ekz., fervojojn kaj ŝipegojn, aviadilojn, tramojn kaj aŭtomobilojn, higienajn kaj sanigajn loĝejojn kaj hospitalojn, invalid-kaj maljunulprizorgadon, ŝtadadministradon, jurosystemon, ordon, sekuron, ktp.

Tiel la “menso” faras nin mastroj super la okazaĵoj; sed estas ankaŭ ĝi, kiu faras nin sklavoj de ili. La “menso” de la viva estulo estas la absoluta potenco malantaŭ ĝia tuta manifestado kaj kreado.

10. Nia propra mensio, nia propra apero identas kun eterna vivĉeno el kaŭzo kaj efiko

Kio estas do la “mensio”? – La “mensio” estas en la viva estulo la realaĵo, kiu premias ke ĝi estas “viva estulo”. La mensio estas la vivo mem, kaj la vivo konsistas el la du realaĵoj: “kreado” kaj “spertado”, kiujn en mia ĉefverko “Livets Bog” (La Libro de la Vivo) mi nomis “kaŭzo kaj efiko”, kaj kiuj estas tie priskribitaj sub la titolo “la baza rezulto n-ro 2 de la vivo”. “Kreado” povas manifestiĝi nur kiel “kaŭzo” kaj “efiko”. Sed “efiko” nepre iĝas “kaŭzo” de nova “kreado”, el kiu sekvas ankoraŭ novaj “efikoj”, kaj tiu alterno daŭras. Per tio la “vivo” aŭ la “mensio” montras sin senfina ĉeno de spertado, de manifestado kaj kreado, kaj tio evidentigas, ke la vivo estas “eterna” kaj “senmorta”. Estas tiu “eterna” aŭ “senmorta” flanko de la viva estulo, kiu faras ĝin aŭ suferiga, malfeliĉiga kaj mortiga, aŭ ĝojiga, feliĉiga kaj bona, estas tiu flanko, kiu igas ĝin aperi bona aŭ malbona. Tiu “eterna” flanko decidus, ĉu la viva estulo estu simila al la naturo kaj unuiĝu kun la leĝoj, laŭ kiuj tiu naturo

sin manifestas, aŭ ĉu ĝi agu kontraŭ la naturo kaj ĝiaj leĝoj kaj sekve vivu en malharmonio kun la ĉioamplaksa vivo, en kiu oni “vivas kaj moviĝas kaj ekzistas”. Estas la “mensio”, kiu kaŭzas niajn ĉagrenon kaj malfeliĉon same kiel niajn plej altajn feliĉon kaj beaton. Ĉio en nia sorto venas de io en nia “mensio”; kaj ĉar la “mensio” estas tiom decida faktoro en la sorto, jes, fakte identas kun nia sorto mem, la imago, ke oni pro agoj de aliuloj povas fariĝi “martiro” kaj sperti turmentojn, estas nura “superstiĉo”. Neniu alia estulo estas nia vera, plej danĝera “malamiko”, aŭ la reala “kaŭzo” de nia “malfeliĉo”, kaj tiel same neniu alia povas esti la vera “kaŭzo”, se nia sorto estas “feliĉo” kaj “beato”. Kiel tio povus okazi? – Ĉu ni konceptas la okazaĵojn kiel “feliĉon” aŭ kiel “malfeliĉon”, ne dependas de ago al ni fare de kunhomoj; ne temas pri tio, kion ili faras aŭ ne faras. La vera “kaŭzo”, kiam ni perceptas ion “bona” aŭ “malbona”, estas nur nia propra “mensio”, nia propra aperado kiel eterna vivoĉeno de “kaŭzo kaj efiko”. Pro tio ni neniel povas sperti “efikojn”, kiujn ni mem ne kaŭzis antaŭe. “Efikoj” tute ne povas estiĝi sen antaŭa “kaŭzo”. Se homo sur malluma vojo subite atakas kaj prirabas nin, kaj eble vundas kaj kripligas nin, tiam ni ja iĝas objekto de serio da “efikoj”. Koncerne tion oni eble volas aserti, ke en tia situacio ni estas tute senkulpaj, kaj ke la atako estas “krimo”, kiun kun plena rajto ni povas “venĝi” per “puno” al la atakinto. Laŭ la jura leĝaro kaj jura sistemo, kiujn pro bezono aplikas provizore ĉiu kultura socio, tia venĝo estas tute justa. Alimaniere oni ne povas juĝi la okazaĵojn, dum oni vivas en la nuna senso-regiono kaj havas je dispono nur malvastan superrigardon super la vivmistero. Sed samtempe oni notu la fakton, ke la materialo, laŭ kiu oni faras la juĝon, ampleksas nur etan lokan regioneton en la

giganta interagado de fortoj, kiuj konsistigas la tutaĵon, kaj kiuj en ĉi tiu okazo estas “la eterna kaŭzo- kaj efikoĉeno” de la atakinto. Pro sia “eterna” ekzistado tiu ĉeno estas identa kun la “senfineco”. Kiam ni ne povas vidi la tutaĵon, sed male nur mikroskopan parton, kiel ni do povas esti certaj, ke nia juĝo de la ago de la rabisto estas absolute “justa”?

11. La manifestado, rabado aŭ karesado fare de nia proksimulo, estas nur mikroskopa ero en eterna ĉeno de kaŭzoj kaj efikoj

La menciita konduto, kiu iĝis “efikoj” en nia sorto, en nia vivoĉeno de “kaŭzoj kaj efikoj”, estas, kompare kun la senfineco de tiu ĉeno kaj kun tiu de la rabisto, tiom mikroskopa, ke tio evidente ebligas, eĉ igas verŝajna, ke la konduto, vidate per ĉioampleksa rigardo montras sin tute alia ol vidate nur de nia nuna loka vidpunkto, laŭ kiu “fiksiĝas la puno”. Vidante nur unu literon el la teksto en libro, kiu ampleksas milojn da paĝoj, oni ja tute ne povas scii, kun kiuj aliaj literoj en la verko ĝi estas ligita, kaj ankaŭ ne kiun lokon ĝi havas, kaj kian signifon por la tutaĵo de la libro. Sekve de tio niaj konstato kaj juĝo de la litero neniel povas esti perfekta kaj kompleta juĝo de la libro, ĉar en tiu kazo tute mankas al ni la necesa scio por juĝi. Sed la juĝo malkaŝas nian propran simpation aŭ malsimpation al la litero, kiu ja povas aperi tia, ke ĝi – ekz., per arta beleco – plaĉas al nia gusto, ke ni admiras ĝin kaj ĝojas pro ĝi, aŭ tia, ke ĝi malplaĉas al ni kaj tial elvokas nian malsimpation kaj mallaŭdan kritikon. En ambaŭ okazoj niaj juĝo kaj kritiko neniel tuŝas la veran kvaliton de la litero aŭ ĝian signifon por la verko, en kiu ĝi estas. La mezurilo, kiun ni uzas por mezuri ĝian ekzistorajton, estas do nur ĝia rilato al ni, nur ĝia “efiko” al nia “menso”. Niaj kritiko, simpatio aŭ malsimpatio

pri la litero estas la reago al ĝi de nia propra “menso”. Sed, ĉar tiu ĉi reago, kiel jam vidite, povas esti simpatia aŭ malsimpatia tute sendepende de ĝiaj veraj ekzistorajto kaj neceso en la koncerna verko, tio montras, ke la tuta juĝoproblemo vere ne estas demando pri la ekzistorajto, la rolo aŭ la vera analizo de la litero, sed nur demando pri la reago al ĝi de nia propra “menso”. Ĉu tio ne donas klaran bildon de la reago, kiun faris nia “menso” al la menciita rabisto, kiu esence estas nia proksimulo? – Senkonsidere ĉu la manifestado de la proksimulo estas rabo aŭ kareso, ĝi neniel povas esti io alia ol mikroskopa ero en la tutaĵo de lia senfina ĉeno de “kaŭzoj kaj efikoj”, de lia vivo aŭ eterna aperado. Kiom ajn dolora estas al ni la malgranda epizodo, kiun ni spertis, ĝi restas tamen nur unu “litero” en la granda “libro”, lia eterna estado. Kompare kun la verko, kiun antaŭe ni fiksas je kelkmiloj da paĝoj, tiu ĉi libro estas pli granda, ja eĉ giganta, ĉar kion signifas miloj da paĝoj rilate al senfina verko, rilate al la eterno mem. Tiel montriĝas, ke nia juĝo: “rabisto” pri la proksimulo tute ne rezultas el kompleta ekzameno de lia vera alta memo, de la dia “libro” aŭ “eterna verko”, kiun li konsistigas kiel viva estulo. En “eterna” verko la raba ago de nia proksimulo povas maksimume simboli unu literon, kaj nia juĝo estas nura elmonro de nia reago antaŭ tiu litero.

12. Nia proksimulo tute ne povas esti la unua kaŭzo de nia sorto

Tiu proksimulo tute ne estas la origina “kaŭzo” de tio, ke ni iĝis objekto de la ago kiun ni esprimas kiel “rabo”; estas kontraŭe tiel, ke ĝuste ni mem estas la origino de tiu okazaĵo; sed ordinare tio kuŝas tute ekster nia ĉiutaga, fizika konstatopovo. Ke entute la ago de nia proksimulo povis penetri en nian sorton, en nian propran “ĉenon de kaŭzoj

kaj efikoj”, venas simple el tio, ke en iu tempo, eble en antaŭa vivo, ni formis per nia agado la propran ĉenon tia, ke estiĝis eblo por kolizio kun “la kaŭzo-kaj efikoĉeno” de tiu proksimumo. La faktoj montris do, ke ni povis iĝi objekto de – “efikoj”. Sed “efikoj” tute ne povas estiĝi sen antaŭa “kaŭzo”, kaj tial devas esti iu “kaŭzo”, kiu kondukis nin en la situacion, kie ni povis esti prirabataj. Estas tute neeble trovi la “kaŭzon” ĉe la proksimumo, ĉar ĝi nepre devas estas kreita jam antaŭ nia renkonto kun li. Kiam do la “kaŭzo” de la prirabo troviĝas ĉe ni mem jam antaŭ ol ni renkontis la rabiston, tiam iĝas fakto, ke ĉi tiu tute ne povas esti la “unua kaŭzo” de nia sorto. Tio validas en ĉiu ajn situacio. Kion ajn kunhomo faras al ni, tiu povas neniam kaj en neniun manieron esti la “unua kaŭzo” de la enmikso en nian sorton. Anticipe devas ĉiam esti iu “kaŭzo”, kiu faris nin objekto por la agoj de la kunhomo, senkonsidere ĉu temas pri rabo aŭ pri kareso, pri malamo aŭ amo. Devas esti iu “kaŭzo”, kiu igis nin renkonti lin kaj ekriklati kun li. Ke eble ni mem ne elserĉis lin, sed estis li, kiu elserĉis, tio ne ŝanĝas la principon. Se li elserĉas nin, kvankam ni eble ne konas lin, tio povas okazi nur tial, ke ni alvokis aŭ faris ion, kio altiris lin, ion, kio vekis lian intereson, ĉu favoran, ĉu malfavoran al ni.

13. La kredo de la homo, ke la proksimumo estas la kaŭzo de ĝia sorto, estigas ĉiujn malfeliĉajn sortojn en la tuta mondo

Kiel ni vidis ĉi tie, la “unua kaŭzo” de niaj spertoj povas en neniun okazon estiĝi ĉe aliulo, sed nur ĉe ni mem. Senkonsidere kiel la vivo sin formas por ni, kaj kiajn spertojn ni ekhavas, en ĉiuj situacioj nepre staras antaŭ ni la demando: kio kaŭzis, ke ni venis antaŭ ĉi tiujn okazaĵojn, – ĉar nur tio, kio “kaŭzis” ĉi tion, povas esti la vera “kaŭzo” de tio,

ke tiuj okazaĵoj fariĝis nia sorto. Tiu “kaŭzo” nepre ekzistis antaŭ nia renkonto kun la menciitaj okazaĵoj kaj ilia estiĝinto, alie la renkonto neniam povus okazi, kaj tial la menciita estiganto neniel povas, kiel jam montrite, esti la vera kreinto aŭ “unua kaŭzo” de nia sorto.

Sed malgraŭ tio, la “menso” de la tera homo bazas sin sur la kredo, ke la kunhomoj kaŭzas la propran sorton, kaj ĝi kondukas “bone” aŭ “malbone” al ili laŭ sama grado, kiel ĝi kredas ilin “bonaj” aŭ “malbonaj” al si mem. Tiu “kredo” estas la absolute gvida forto en la “menso” de la ne finevoluinta tera homo, kaj sekve la vere gvida aŭ direkta faktoro ankaŭ malantaŭ la volo. Kaj ĉi tie ni venis al la plej profunda analizo de la potenco, kiu realigas ĉiujn malfeliĉajn sortojn en la mondo kaj abundigas kaj kulminigas la suferojn kaj la militon en la terhoma socio. La ĉiorega potenco malantaŭ la volo kaj sekve ankaŭ malantaŭ ties materia efektiviĝo estas ĝuste la menciita komplete erara “kredo”, tiu falsa koncepto pri si mem kaj pri sia proksimumo. Estas okulfrape klare, ke tiu “falsa kredo” pri sia proksimumo neniel povas fari la menson amika, luma kaj bonvola al tiu. Malgraŭ tio, ĝi tamen estas la sekreta, ĉiorega potenco malantaŭ la volgvidado de la estulo, la potenco kiu formas ties menson, kreas ties ties influeblon, imunecon, simpation kaj malsimpation, kaj tutan sorton, – kaj ĉi tie ni estas ĉe la radiko de senescepte ĉiu “malbonaĵo”. La origina potenco malantaŭ ĉiuj armiloj, malantaŭ ĉiuj ruinigaj, torturaj kaj mortigaj faroj estas do la menso formita laŭ tiu “erara kredo” pri la proksimumo, kredo, kiu sekvigas la fikcion mem esti “martiro” kaj “maljuste” traktata de la proksimumo. Ne mirige, ke pere de la plej grandaj saĝuloj de la mondo kaj pere de la religioj kaj moralaj leĝoj, kiujn ili kreis, la mondsavado koncentriĝas en la

sola granda ordono, “Amu vian proksimumon kiel vin mem”, diskonigante, ke tio estas “plenumado de la leĝo”.

14. La perfektigita homo ne bezonas mortigi por vivi. La mikrovivo de la fruktokarno pluvivas en la homa organismo kaj tiel plenumas sian Dian planon kaj celon

La “erara kredo” pri la proksimumo nepre estas la plej granda “malbono” de la tera homo. Ĝi estas la “ĝermo” aŭ “kerno” de la propra malfeliĉa sorto – sendepende de la speco de malfeliĉo aŭ malagrablo renkontata. Kiam la homo povos centelcente ami sian proksimumon, sekvos neeviteble, ke li atingos la vivosferon, kie malsanoj kaj akcidentoj estas tute maleblaj same kiel milito, persekuto kaj torturo al kunestuloj. Komprenible tia perfekta amo ampleksas ankaŭ ĉesigon de mortigado de la “bestoj”, kiuj estas niaj kunestuloj en la animala sfero. Ankaŭ ili ja apartenas al la kunkreitoj, kiujn Dio benis post la kreado, kaj al kiuj li ordonis: “Fruktu kaj multiĝu kaj plenu la teron”.

Ĉu oni ne kredas, ke estas la Dia intenco, ke la homa menso plendezire partoprenu la komprenon kaj efektivigon de tiu dia volo? – Li tute ne diris, ke la bestoj estu “nutraĵo” por la tera homo. Eĉ kontraŭe, ĉar – ĉu ne ĝuste tiu “nutraĵo” apartenas al la “malpermesita frukto”? – La dia volo koncerne la “nutraĵon” de la tera homo estas tute klara en la biblia tansdonajo, laŭ kiu Dio diris al Adamo kaj Eva: “Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo”. – Ĉu tio ne konformas kun la kvina ordono: “Ne mortigu”? – La perfekta Adamo, aŭ la perfekta homo, ne bezonas mortigi por vivi. Manĝi arban frukton, en kiu estas semo (kerno),

signifas do manĝi la fruktokarnon, kiu ĉirkaŭas la kernon, kaj forprenante tiun karnon oni ja liberigas la kernon kaj ebligas al ĝi esti semata por poste ĝermi kaj disvolviĝi. Esti “manĝata” kaj konsumata kiel nutraĵo en iu organismo signifas ja por la fruktokarno la avantaĝon, ke ĝiaj mikroestuloj (la viva en la substanco) havas okazon daŭrigi sian vivon laŭ natura maniero en substanca mondo, en la karno kaj sango de la organismo, en kiu ili konsumiĝas kiel “nutraĵo”. Tiel ĝi plenumas la dian planon kaj intencon. En mala okazo ili estus lasitaj al “proceso de putrado”, kio nepre signifas nenaturan morton kaj pereon por la mikrovivo, signifas baron antaŭ ĉiuj ebloj por plua normala vivado. Ne ŝanĝas la veron de la principo aŭ la validon de la Dia ordono, ke la tera homo ankoraŭ ne povas vivi nur per la menciita delikata kaj viva substanco. Kontraŭe tio montras simple, ke la kreado de “Adamo” ankoraŭ ne finiĝis. Ankoraŭ li ne estas “homo laŭ la bildo de Dio”. Sed malgraŭ tio, ke la tera homo ankoraŭ ne tiom progresis en sia evoluo aŭ dia formiĝo, estas tamen fakto, ke li troviĝas en tia situacio kaj estas ĉirkaŭata de tiom da ebloj por vegetara nutraĵo, ke mortigi bestojn neniel estas vivkondiĉo por li.

15. Mortigata la besto konscie spertas doloron, dum la planto nur sentetas malagrablon

Ja estas tiel, ke la vegetarano bezonas manĝi nutraĵon, kiu ne tute kongruas kun tiuj gvidlinioj, kiel ekz-e radikojn, tigojn, foliojn kaj kelkfoje eĉ kernojn, kio kaŭzas, ke la situacio ne estas tute konforma kun kompleta plenumiĝo de la dia ordono. Sed “Adamo”, kiu plenumas ekz. naŭdek elcentoj de tiu ordono, estas pli proksima al sia perfektigo, pli konforma kun la “bildo de Dio”, ol iu “Adamo”, kiu malobeas ĝis naŭdek elcentoj. Memkomprenible venos la efikoj de tia

malobeo. Ĉu ne ĝuste per la efikoj de la “malpermesita frukto” la tero devis esti “malbenita”, kio signifas: plena de malharmonio, doloro kaj sufero? –

Sed kial do “mortigo” de plantoj kaŭzas malpli da sufero? Pli-malpli okazas ja mortigo, kiam temas pri manĝo de radikoj, tigoj kaj kernoj. – La respondo estas, ke la fundamenta parto de la klara tagokonscio de la planto ne funkcias en la fizika sfero; ĝia plej alta sensokapablo ĉi tie estas nur malforta komencanta “kapablo senteti”, kaj tial ĝi estas, plejparte, ankoraŭ “nenaskita” estulo en la fizika sfero. Ĝia nervaro estas tiom neevoluinta, ke difekton en la fizika organismo ĝi povas registri nur kiel pli-malpli senteban “malagrablo-senteton”. Figure oni povas diri, ke la besto havas centelcentan kaplabon senti doloron, dum proporcie al tio la planto havas nur kvinelcentan kaplabon. Kio superas tiujn kvin elcentojn, la planto neniel povas konscii kiel malfeliĉon aŭ suferon, kaj estas do tute ekster ĝia sorto. Kaj kiam nur la pura fruktokarno, nur la maturaj fruktoj, estas uzataj kiel nutraĵo por animala organismo, tiam malaperas por la planto ja ankaŭ tiuj kvin elcentoj da senteto pri malagrablo.

16. Kruda potenco kaŝas sin en la moderna kulturo kaj edukiteco, en la socie rekonata “bontono”

Kiam la tera homo – malgraŭ la supre menciitaj faktoroj – tamen frandas la organismojn de siaj kunestuloj, la karnon kaj sangon de la bestoj, kaj en kelkaj okazoj faras el la mortigado de tiuj kunestuloj eĉ “distran tempopasigon”, sporton kaj “plezurĉasadon”, “plezurfiŝkaptadon” kaj simile, tiam ĝi estas centelcenta malobeanto de “la vivoleĝo” mem, kaj ankaŭ ĉi tie do montriĝas, ke la “menso” estas la ĉiorega potenco malantaŭ la homaj agoj, ankaŭ malantaŭ tiuj de “plezur-mortiganto”. Ne ŝanĝas la principon

aŭ la senkompromisan postulon pri plenumiĝo de la leĝo, ke la estulo, per la socie rekonataj “modo”, “moro” kaj “edukiteco” aŭ tiel nomata “kulturo”, kovras kaj kamuflas siajn imagon kaj eraran supozon havi rajton mortigi, kaj faras tion en la sama maniero, kiel li kovras multajn aliajn ekscesojn kaj konfliktojn kun “la vivoleĝo”. Ke la plimulto malobeas la vivoleĝon, ja ne faras la malobeon plenumiĝo, kaj sekve ne forigas ĝiajn efikojn. Kontraŭe tio faras el la malobeo potencon. Per la unuvoĉeco la multaj malobeantoj faras la malobeon socie rekonata. La unuopa malobeanto havas malantaŭ si la potencon kaj kun ĝi la benon de la homamaso. Imagu, kio do okazas, kiam la amasa “potenco” benas la malobeon de “la vivoleĝo”, benas subfoson de la ekzisto de la perfekta vivo mem. Ĉu ne la konsento kaj beno fare de la amaso faras el fumado de tabako, el ĝuo de alkoholaĵoj, el ĝuo de viando, sango kaj aliaj animalaj produktoj nepre bezonataj faktoroj en la tiel nomata “bontona” konduto? En societo de ekz. 50 personoj de tia “bontono” kun ĝiaj superregaj kaj socie rekonataj modernaj “edukiteco” kaj “kulturo”, oni fakte bedaŭras kaj kompatas ĉeestantan “vegetaranon”, “nefumanton” aŭ “nedrinkanton”, kaj eble eĉ traktas tiun per spritaĵoj, ridoj kaj moko. Li estas nepre konsiderata “strangulo” en tia societo. Imagu kiom da kruda potenco tiel sin kaŝas sub la modernaj “edukiteco” kaj “kulturo”, sub la socie rekonata “bontono”.

Kaj kio estas do tiu “kulturo”, tiu “edukiteco” aŭ “bontono”? – Ĉu ne ĝi simple estas “la menso de la amaso”? – Esti “nobla homo”, esti “bonmora” kaj “kulturita” signifas do havi “menson” kiel tiun de la amaso, egale ĉu tio eble kondukas al murdado kaj ĉiaj aliaj ekscesoj. Kiom danĝere do estas havi “menson” kaj “pensomanieron” nur kiel “la amaso”, kaj, kontraŭe, kiom die havi

menson, kiu laŭpove kuraĝas plenumi “la leĝon de la vivo” tute sendepende de “la opinio de la amaso”. Sen tiaj kuraĝaj estuloj, la amaso neniam prosperus en kulturo, sed neeviteble dekadencigus siajn moralon kaj agmanieron. Nur tiu, kiu kuraĝas obei al “la vivoleĝo”, spitante per tio la opinion de “la amaso”, estas ties spirita gvidanto, kvankam li fizike estas konsiderata “strangulo”. Ke oni mokas kaj persekutas lin estas nepra signo, ke efektive li levas la menson de “la amaso”; ĝi nome signas, ke “la amaso” sentas lian aŭtoritaton kaj jam fartas malbone pro tio. Tial okazas persekuto al la aŭdaculo, kiun la amaso sentas danĝera rilate al siaj superstiĉo, imagitaj “kulturo” kaj “edukiteco” kaj la daŭra kontentigo de ĝiaj nenaturaj mortigemaj inklinoj kaj avidoj, ne precize pro tio, ke li propagandus aŭ penus akiri adeptojn, sed ĉar en pli-malpli alta grado li plenumas per sia agmaniero la vivodevon.

17. Kiam la menso aŭ la sekreta potenco malantaŭ la armiloj transformiĝas al amo, la pordo de la lumo malfermiĝos por la homaro

Kiel ni vidis ĉi tie, la “menso” estas do la absolute ĉiorega potencofaktoro malantaŭ la volgvidado, kaj tio validas ne nur en rilato al aliaj homoj en la fizika regiono, sed ankaŭ, kaj en ekstreme alta grado, en nia rilato al la “bestoj”, kaj al la “nutraĵo”, kiun ni manĝas. Ĉio, kion ni faras, estas efiko de nia menso. La “menson” povas direkti nur spirita lumo, tio estas intelekto, kono kaj scio pri la fenomenoj, kaj tial “la granda bezonaĵo” por la nuntempa surtera homo estas spirita lumo, lumo kaj denove

lumo; sed tiu lumo ne estas nur kono pri pezo kaj dimensio, ĝi ne estas demando pri distanco al la suno aŭ pri la pezo de la tero. Ne temas pri la hodiaŭaj “moroj kaj kutimoj”, aŭ pri tio, kion oni konsideras “bontona”. Ankaŭ ne temas pri la vivmaniero de nia proksimulo aŭ pri lia kondukmaniero antaŭ ni. Temas, kontraŭe, pri kono pri “la vivoleĝo” kaj pri la kapablo praktiki ĝian plenumadon. Pro tio ke la “proksimulo” identas kun la vivo, la vivoleĝo estas “la leĝo pri la konduto al la proksimulo”. Sekve nia tuta sortokreiĝo kaj ĉiuj niaj ebloj por atingi veran feliĉon aŭ ĝojon pro nia ekzisto dependas komplete de nia ĉiutaga konduto al tiu “proksimulo”. Lia vivo estas la kampo, sur kiun ni semas la fruktojn, la kernojn aŭ la semojn de nia “menso”. Tio signifas, ke seminte tie malamon, ni kreskigas sur ĝi venenajn, mortigajn plantojn kaj faras el ĝi ejon de milito, torturo kaj morto; kaj seminte amon ni kreas sur ĝi dian ĝardenon plenan de belaj vivigaj arboj, arbustoj kaj floroj, kiuj elradias beatecon kiel fonto de milda lumo.

Kiam la “menso”, tiu “sekreta potenco malantaŭ la armiloj”, fariĝos amo, tiam la pordoj de la lumo malfermiĝos por la homaro. La superstiĉo de morto ne plu estos, kaj ankaŭ ploro kaj grinado de dentoj, sufero kaj vekriado estos forigitaj de la kontinentoj de la homaro. La iro de la tero en spaco kaj tempo estos lumanta vojo de paco en la universo.

De prelego en Martinus-Centro la 5an de julio 1944. Dana titolo: “Den hemmelige magt bag våbnene”. Presita lastfoje en dana Kosmos 9, 2000, kaj en Artikolaro 1, n-ro 17.

*Traduko de Ib Schleicher en 1969.
Prilaborita de Henning Sato von Rosen
kaj Hokan Lundberg en 2014.*

Kio estas mondliberiganto?

Demando: En la analizoj de Martinus Jesuo ofte menciigas kiel mondliberiganto. Ĉu eblas ricevi pli precizan klarigon pri la signifo de tiu vorto? – En la kristanaj preĝejoj oni ja uzas la vorton ankaŭ kun la signifo savanto, sed kun tiu senco, ke Jesuo liberigis nin kaj neniiĝis niajn pekojn.

Martinus respondas: Estas ĝuste, ke en miaj analizoj mi nomas Jesuon Kriston mondliberiganto. Kiam mi konceptas lin tiel, do ne estas sur la sama bazo kiel tiu, sur kiu la religiaj aŭ preĝejaj aŭtoritatoj konceptas lin kiel savanton aŭ liberiganton. Ili kredas, kiel konate, ke Kristo nur venis en la mondon por fariĝi krucumita aŭ punita pro tiuj pekoj, kiujn li ne mem, sed la homoj faris. La samaj aŭtoritatoj sekve kredas, ke pro tiu krucumo ĉiu homo povas liberiĝi de la puno pro tiuj pekoj aŭ tiu malbono, kiujn ĝi faris kontraŭ siaj kunestuloj kaj per tio povas veni en la ĉielan regnon. Tiel la ĉiela regno fariĝas nur zono aŭ hejmloko por estuloj, kiuj ĉiuj forkuris de sia respondeco per tio, ke ili lasis senkulpan estulon suferi pro tiu malbono, kiun ili mem faris, kaj pro kiu ili mem devus esti punataj. En la ĉiela regno neniel povas esti bonfarto, feliĉo kaj raviĝo, kiujn oni proprigis al si per turmento, krucumo kaj morto de senkulpa estulo. La ĉiela regno ne povas esti bono, kiun oni povas proprigi al si per tiel terure malalta kaj malmorala metodo, ke ĝi estas analoga al tiuj metodoj, kiujn en la jura sistemo oni konsideras kiel krimon kaj punas per la morto. Kaj Dio ne povas esti tia malnobla kaj mizera reprezentanto de justo, kaj ankaŭ ne tiel sangavida, ke

por entute pardoni la estulojn pro iliaj pekoj, kun kiuj li cetere mem kreis ilin, li postulas vidi krucumon, suferon kaj morton de senkulpa estulo.

Ĉu ne ĉi tie estas facile vidi, kial la homoj forlasas la kristanismon, fariĝas dubantoj, fariĝas sendiaj, fariĝas materiistoj, laŭ tio ke la intelekto elkreskas. Estas ĉi tie en la dudeka jarcento, ke la mondliberigado envenis kaj malligos aŭ liberigos la homojn de la nun tiom malreligiakcela religia mondbildo kiel ankaŭ de la de tio sekvanta sendia, materiisma mondbildo, kaj per tio konduki la homaron antaŭen al la fina, natura ekvilibro inter ĝiaj fizika kaj psika scioj.

Ĝuste tiu ekvilibro estas la sola vojo al iniciĝo, al kosma konscio, al spirita liberigo aŭ suvereneco kaj sekve al la mensa kunfandiĝo kun Dio aŭ la mondkonscio, kiu faras la estulon unu kun la Patro.


La ekvilibro kaj la mondliberigo faras, pere de la spirita scienco, ke la homaro eliros el la zono de malamo, milito kaj suferoj antaŭen al la vivo en la absolute sunluma paco kaj al ĉiela regno, kiu ekzistas nur pro la fundamento de vere proksimula amo, kaj ne surbaze de pereco de aliaj estuloj per korpa turmentado, krucumo, mokado kaj malestimo, sufero kaj morto pro pekoj, kiujn ili neniam faris.

Nun en la dudeka jarcento la homaro estas en mensa krizo, kiu minacas al pereco de tuta kulturo, ĉar la homoj pro sia superdimensia fizika talento, sed preskaŭ tuta manko de psika talento – ne mem povas trovi rimedojn aŭ vojojn por savi sin, sen pere de superdimensiaj vivneniigaj, kulturdetruaj iloj. Tial ili faras la kreon de mortigiloj, kaj per

tio pli kaj pli grandan kulturdetruan kapaciton la plej alta idealo. Ili ne komprenas, ke per tio ili sinkas pli kaj pli profunde en suferon kaj pereon. Milito ne povas savi la mondon. Ne tiom estas mortigiloj, kiujn la homoj bezonas, sed plej multe por ili necesas ŝanĝo de menso. Sen tiu ŝanĝo la terĝlobo antaŭ multe da jaroj estus komplete sentaŭga por homaj kulturo kaj vivo. Sed dank' al la mondliberiga principo, kiu estas la samo kiel amprincipo, kiu kondiĉas, ke gepatroj gardu la idon, ĝis ĝi atingos la plenkreskulan aĝon, kiu kondiĉas ankaŭ, ke la homaro havos certan parton de protekto, ĝis ĝi estos en spirita plenaĝo.

Per ĉi tiu principo la homaro estos gvidata antaŭen al liberigo el tiu infero kaj satana filozofio de mortigado, kiujn ĝi mem kreis, – same kiel ĝi liberiĝis el ĉiuj ĝiaj antaŭaj mensaj krizoj en ĝia historio. Tiuj krizoj ĉiam ripetigis en tiaj periodoj, kiam la ĝeneralaj moralkonceptoj aŭ la dikoncepto estis elĉerpitaj aŭ malnoviĝintaj, pro la intelekta evoluo de la estuloj. Oni sentas laŭgrade la ĉefajn kulturkonceptojn nur kiel naivajn. La estuloj fariĝis pli aŭ malpli senmoralaj. Pro tio ili ne havis aliajn rimedojn ol la ĝangalan leĝon: “La rajto de la plej forta”. Ĉiufoje kiam la religia fundamento ŝanceliĝis, tiu naturo de ĝangalo havis novan renesancon aŭ floradon. Sed kiam tiu mizero de la homaro estis plej granda, la helpo estis plej proksima. La mondliberigado komencis neskueble. Kaj ĉiam naskiĝis estulo kun precize tiuj psikaj talento kaj scio, kiuj necesis por novigi la spiritan fundamenton de la krizotrafitaj homoj tiom multe, ke ili povis savi sin parte el la brakumo de la ĝangalo kaj esti gvidataj antaŭen en tiu nova plialtigita kulturo.

La estulo, kiu tiel naskiĝis, kompreneble estis estulo, kiu antaŭis la terhomojn en la longa evoluvojaĝo en la



Martinus ĉe skribotablo

spiralciklo kaj per tio antaŭ longe superis ilin sur tiuj kampoj, kie ili ankoraŭ estis malpli talentaj kaj senhelpaj.

Estas tiaj estuloj, kiujn ni konas en la historio de la homaro kiel “mondliberigantojn”. Estas tiuj estuloj, kiuj origine estis reĝoj, ĉefpastroj kaj profetoj. Ili liberiĝis la homojn de la malnoviĝintaj dogmoj kaj tradicioj, donante al ili iujn novajn kaj pli tempoadaptitajn dogmojn. Por la okcidentaj popoloj Kristo fariĝis en sia tempo la plej granda mondliberiganto. Tra li manifestiĝis tiel granda spirita gvidlinio, ke ĝi neniam ajn estus superita. Tial ĉiuj gentoj de la tero estu benitaj pere de ĝi. Kaj estas tiu plenumo, kiu okazas pere de la mondliberigado de la dudeka jarcento. Kaj per tio la misio de la mondliberigado sur la tero estos plenumita. Per tiu lasta granda aktivigo de tiu dia principo ĉiu terohomo povos iom post iom mem atingi la iniciĝon, kiu signifas atingi spiritan maturecon kaj aĝon. Ĝi tiam mem fariĝis “la vojo, la vero kaj la vivo”. Kaj tie, kie ĝi povas lumi per sia propra lumo, ĉiuj aliaj fontoj de lumo estas superflujaj.

Trad. Ib Schleicher en 1997

La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon?

Demando: Kial la “Martinus-movado” ne havas konvenan nomon, povas esti karakterizata samkiel aliaj spirita movadoj, kiel Teosofio, Antroposofio, Atestantoj de Jehovo ktp.?

Martinus respondas: Ĉirkaŭ mia spirita laboro neniel en iu ajn formo ekzistas nek iam ekzistos asocia, sekta aŭ religia formiĝo kun statutoj kaj reguloj, kun sakramentoj kaj baptoj ceremonioj k.s. Tiel ne troviĝas iu ajn “movado” al kiu doni nomon.

Ke mia spirita laboro ricevas pli kaj pli da interesitaj studentoj kaj legantoj ja ne signifas, ke pro tio eblas nomi ilin organizita religia komunumo. Same malmulte oni konsistigas paroĝon, sekton aŭ eklezion, per studado aŭ legado de sciencaj verkoj de iu ajn alia verkisto. Mia tuta spirita laboro celas nur esti instruado aŭ manifestado de scio en formo de analizoj de la mondbildo kaj per tio reveli la premisojn de la proksimula amo aŭ la humana vivmaniero aŭ sinteno, kiu identigas la homon kun la mondpaco. El tio sekvas ke mia laboro, pro sia

intelekta strukturo, neniam ajn povos fariĝi religio bazita sur kredo. Male, ĝi povas ekskluzive fariĝi nur lernejo, edukado, institucio por gvidado kaj edukado pri vivscienco, per kiu la studento povas kontaktiĝi kun sia dieca transformiĝo de besto al “homo laŭ la bildo de Dio simila al li”.

Tiu mia laboro sekve estas por absolute ĉiuj verserĉantoj tute sendependa de iu ajn religio, nacio aŭ raso al kiu ili apartenas. Miaj analizoj estas samkiel ĉiu ajn alia scienco absolute neŭtralaj kaj nepartiaj.

Ĉar mia spirita laboro do estas manifestaĵo de, kaj gvidado en la eternaj analizoj de la mondbildo, ĝi tute simple karakterizeblas kiel kosma scienco, kiu siavice egalas al spirita scienco, samkiel la studentoj de tiu spirita scienco esprimeblas nur kiel spirita esploro. Esprimi mian spiritan laboron kaj ties interesitajn esploristojn per aliaj terminoj povas esti nur esprimo de plena miskompreno.

El dana Kosmos nr. 1, 1989.

Trad. Henning Sato von Rosen.





La Ĉi-metodo

Pri la Ĉe-metodo multaj Esperantistoj aŭdis, sed ĉu vi aŭdis pri la Ĉi-metodo? Ĝi temas pri diri “ĉi” en si mem laŭeble ofte, aparte en malfacilaj situacioj.

Ĉi tiu “ĉi”-sono helpu nin memori ke:

- Ĉiuj estas parto de Dio kaj agas laŭ siaj antaŭaj spertoj faras sian plej bonan, ankaŭ ni.
- Ĉio kion ni renkontas estas enerigoj de ni mem kiuj revenas al ni tra homoj kaj okazaĵoj ĉirkaŭ ni.
- Ĉiaj spertoj, aparte la pezaj aŭ malfacilaj, longpersektive riĉigas nin kaj ankaŭ donas al ni eblon ekzerci nin por iom post iom iĝi pli toleremaj, komprenemaj kaj amemaj homoj.
- Ĉie sekvas nin gardanĝelo kiu zorgas pri nia evoluo al iĝi “preta homo”.
- Ĉial indas pardoni aliajn, kaj ankaŭ nin mem, por la ankoraŭ ekzistantaj bestaj flankoj kaj agoj.
(Kvankam ni ekzercas nin dum miloj da jaroj, ni ankoraŭ faras multajn “erarojn” – simile kiel muzikanto faras erarojn dum ekzercado de nova muzikpeco. Tio estas tute natura afero en nia nuna evolustato.)
- Ĉiam okazas dialogo inter ni kaj Dio, per ĝi Dio instruas al ni multajn aferojn kaj per ĝi ni ankaŭ iom post iom ekkonos Dion kiam ni plene konscios pri tiu ĉi dialogo.
- Ĉies mio estas “eta radio” de la dia mio, kio signifas ke ni ĉiuj estas “gefratoj” el kosma vidpunkto.
- Ĉiom amas nin Dio, sendepende de ĉio. (Ne gravas sur kiu evoluŝtupo ni estas, Dio same multe amas ĉiujn “di-filojn”.)
- Ĉiel indas provi, iom post iom, ŝanĝi nin al pli amemaj kaj toleremaj homoj.

Volonte provu ĉu la ĉi-metodo funkcias por vi. Ĝi povas funkcii kiel komplemento al preĝado, kio ja estas la plej forta magia forto kiu ekzistas en la mondo.

Ĉi-eme salutas,
Hokan Lundberg



Epokfara mondbildo

de Sven-Erik Rævdal

“Tie, kie nescio estas forigita, la tiel nomata ‘malbono’ ĉesas ekzisti”

Per la supra karakteriza citaĵo el la ĉefverko *Livets Bog* (La Libro de la Vivo), la dana verkisto Martinus (1890-1981) al ni indikas vojon al nova ekkompreno pri la naturo de la vivo, ekkompreno kiu povas fundamente ŝanĝi nian manieron rigardi la vivon. Tiu ekkompreno ne nur donas logike argumentitan klarigon de la malbonaj kaj suferoplenaj travivaĵoj en nia vivo. Ĝi ankaŭ priskribas evoluon okazoĉenon, kiu kondukos nin al kompreno pri tio, ke la tiel nomata “malbono” plej profunde rigardite ne ekzistas.

Logika ĉioampleksa klarigo

Per sia pli ol 50-jara verkado Martinus kreis ion eksterordinaran, nome logike argumentitan ĉioampleksan klarigon de la vivo – unuigitan spiritsciencan mondbildon, konata laŭ la nomo *La Kosmologio de Martinus*. Lia kvalifiko por tion fari estis alte evoluinta intuicia kapablo, kiu ebligis al li super-rigardi kaj analizi la spiritan mondon, kiu troviĝas malantaŭ la konata fizika mondo. La celo de lia laboro estis krei spiritan sciencan, kiu povas inspiri la verserĉantajn kaj logike pensantajn homojn de nia tempo al pli profunda kompreno pri la senco de la vivo kaj la okazaĵoj en la mondo. Per siaj kosmaj analizoj li prezentas al ni vivkoncepton, multe pli optimisman kaj ampleksan ol la kutima. Vivkoncepto, kiu donas al interesato inspiron vastigi sian komprenon, kaj pri ĉiutagaj travivaĵoj feliĉaj kaj

malfeliĉaj, kaj pri la fundamentaj vivde-mandoj, kiuj rilatas al la senco de la vivo mem, la signifo de la suferoj, proksimula amo, la rolo de la religioj kaj la estonteco de la homaro.

Nenia religio, nenia membreco

La libroj de Martinus estas disponeblaj kiel libera oferto al ĉiuj interesatoj kaj povas esti uzataj de la individuo kiel rimedo por kompreni sian propran vivsituation kaj ankaŭ por la praktika trejnadon por evoluigi sian moralon kaj konduton. Intereso pri lia verko ne estas ligita al iu ajn formo de asociĝo aŭ membreco. Ĉiuj povas libere studi la librojn kaj ĝui la inspiron, kiun ĝi eble rezultigos. La kosmologio de Martinus ne estas religia konfeso, sed donas logike bazitan komprenon pri la vivo kaj ties religia dimensio. Laŭ Martinus, la tempo nun estas veninta por tio, kion li nomas “scienco de amo” aŭ “intelektigita kristanismo”, kaj kiel konsekvenco li donis al sia plena verkaro la titolon *La Tria Testamento*.

La literaturo

Sub la supera titolo *La Tria Testamento* estas publikigita la ĉefa verko, *Livets Bog*, kiu ampleksas sep volumojn. Kiel suplemento al la ĉefa verko li ankaŭ verkis la ses-voluman verkon *La Eterna Mondbildo*, en kiu li per kolorigitaj simboloj kaj klarigaj tekstoj eksplikas la ĉefprincipojn de sia kosmologio. Krom tio, li verkis aron da aliaj libroj kaj grandan nombron da artikoloj. Vidu bibliografion ĉe www.martinus.dk aŭ mendu ĝin ĉe Martinus-Instituto.

Eo-semajno en Martinus-Centro en 2015

Inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 2015 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla, germana kaj hispana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondoj, posttagmeze estos konversaciaj rondoj. En la vespero estos prelego en Esperanto aŭ distra programo, ankaŭ estos teo kaj kukoj en la restoracio *Terrassen*.



Abonilo 2014: Senpage Eo-Kosmos

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo. Rete kaj retroŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Ne plu eblas aboni paperan version de Kosmos en Esperanto. */ Ole Therkelsen*

ESPERANTO
2014
Justa komunikado

INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaĵoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
 Mariendalsvej 94-96
 DK-2000 Kopenhago
 Tel: (+45) 38 34 62 80
 fakso (+45) 38 34 61 80
 Telefentempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk

esperanto@martinus.dk

shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
 kaj Mathias Dalmoŝe.

Kompostado: Dan Elhåge.

La frontpaĝa bildo: © Marianne Maurer

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
 Redono de teksto nur laŭ skriba
 permeso.

Presita de Martinus Institut
 ISSN 1600 4116.

LIBROJ EN ESPERANTO

La libroj en la verkaro **La Tria Testamento** de Martinus estas tradukitaj en la albana, angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda lingvo kaj Esperanto. –

Livets Bog 1,

La Eterna Mondbildo 1 - 4. – Libroj kiuj klarigas la simbolojn de Martinus

Logiko,

Sepulto,

La libretoj:

1. La sorto de la homaro. – Pri la principoj laŭ kiuj evoluas la homaro.

2. Pasko. – La mondhistoria pasko-evento estas analizita tiel, ke ĝi klare reliefigas.

3. Kio estas la vero? – Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke estas grave kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi.

4. Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio. – Tio kio instigis Martinus verki kaj la praktikaj sekvoj.

5. La ideala nutraĵo. – La homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.

6. Folioj el la bildolibro de Dio. – Poetia verko, en kiu i.a. plena priskribo de tansiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkontiĝo inter du homoj.

7. La idolo plej longe vivanta. – Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.

8. La homaro kaj la mondbildo. – Traktas la homan vivon laŭ novaj vidpunktoj kaj ĵetas lumon sur malnovajn kaj novajn problemojn.

9. Inter du mondepokoj. – Traktado de tiu tansira situacio inter primitiveco kaj humanisma vivoformo, en kiu vivas la nuntempa homaro.

10. Kosma konscio. – Mensa suvereneco.

11. La mistero de la preĝo. Klariĝas la preĝon Patro Nia kaj kiel preĝado povas esti scienco.

12. La vojo al iniciĝo. – Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. – Donacokulturo.

13. La kristnaska evangelio. Pri Jesuo kaj la evoluo de la homarao.

Senpaga Esperanto-Kosmos

1. Du fojojn jare vi libere povos elŭti la ret-version de Kosmos en Esperanto ĉe la reta adreso de Martinus-Instituto:
www.martinus.dk

2. Retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni elektronikan version de Eo-Kosmos, se vi sendos vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk